

Christian Morgenstern,  
La malsanulo

*tradukita de Willy Nüesch*

»Ofte volis morti mi...  
Tamen dankas kun sincer'  
mi pro vivo kaj sufer'  
en metita nun' kaj ĉi.

Tiel restos ja tempet'  
por forigo de difekt',  
eĉ sen veno al perfekt'  
pliboniĝos mia pret'.

Mi, sen pov', nun agi jam,  
tamen helpas al la mi',  
kiu post la nun' kaj ĉi  
agos en tie', tiam'.«

*Traduko de la Germana poemo “Der Kranke” de CHRISTIAN MORGESTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

Arg-72-141 (2013-08-28 18:36:59)

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresajon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo “Fonto” n-ro 274 en Oktobro 2003.*

Christian Morgenstern,  
Der Kranke

»Oft zu sterben wünscht' ich mir...  
Und wie dankbar bin ich doch,  
daß ich leb und leide noch  
im gesetzten Nun und Hier.

Bleibt mir doch damit noch Zeit,  
abzubauen manch Gebrest,  
komm ich nimmer auch zum Rest,  
werd ich besser doch bereit.

Wenn ich jetzt nicht wirken kann,  
helf ich also doch dem Mir,  
das dereinst nach Nun und Hier  
wirken wird im Dort und Dann.«

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN MORGESTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31).*

Arg-72-140 (2004-01-31 15:33:31)

*Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der internationalen Literaturzeitschrift “Fonto”, Nr. 274 vom Oktober 2003, erschienen.*